

FN Per Anc 47



7^{me} Année. — N° 6.

Juin 1914

NORMANDA STELO

BULLETIN MENSUEL

Organe de la Fédération Espérantiste Normande

ÉDITÉ PAR LE GROUPE DE ROUEN



Rédaction & Administration

MM. Liébard et Leroux

41, rue de la Vicomté, Rouen

Abonnements

Un an..... 2 fr. : 0.80 (spm)

Ce numéro..... 1 fr. 20

Grâce à l'ardeur des **ESPERANTISTES** pour leur langue
LES ANNONCES DE "NORMANDA STELO"

sont lues aux quatre coins du Monde, cependant, leur prix est des plus modérés

1 page, une fois 20 fr.; un an 200 fr.
 1/2 page » 12 fr.; » 120 fr.

1/4 page, une fois 8 fr.; un an 80 fr.
 1/10 page, « 3 fr.; « 30 fr.

La sola internacia insigno estas

LA VERDA STELO "GASSE"
 kun ore skribita vorto "ESPERANTO"

MODELO REGISTRITA	1 ekz	10 ekz
KRAVATPINGLO verda steleto fr.	0.75	6.00
INSIGNO - pinglo aŭ broĉo	0.75	6.00
» - butono	0.90	7.00

ĈESIGNO - kun stelo sur la
 du flankoj 1.25 10.00

Rabataj prezoj po grande por GRUPOJ, Espe-
 rantito-osejoj kaj libroj. Mendu ilin al via GRUPO
 au per postkarta mandato al Generala Agento :
S^{re} Maurice FLAVIGNY, 18, place de l'Hôtel-
 de-Ville, Le Havre (France)

NORMANDA STELO est envoyé
 gratuitement chaque mois à titre de
 propagande à de nombreuses sociétés,
 aux Syndicats d'initiative, aux Cham-
 bres de Commerce, aux principaux
 fonctionnaires, Consuls, Négociants,
 Industriels, Hôteliers, Cafetiers. Coif-
 feurs, aux Fédérations Espérantistes,
 à de nombreux Groupes Espéran-
 tistes de France et de l'Etranger.

*Fait un service régulier d'échange avec
 les autres journaux & revues*

ANTHRACITE, CHARBONS & COKES

BOIS
de Chauffage
 & D'ALLUMAGE
Charbons de Bois

TOURBES

Maison V. FIEFFÉ, fondée en 1900

G. CHANUT, S^r

40, Rue Lafayette

→ ROUEN

Téléphone 7.66

13^A, Route
 de Neufchatel
 ROUEN

DÉMÉNAGEMENTS

BIENAIMÉ

GARDE-MEUBLES

Téléphone 7.66

Près de la Place

Beauvoisine

FOURNITURES GÉNÉRALES POUR CAVES

MACHINES A RINGER ET BOUCHER LES BOUTEILLES
 ORTE-BOUTEILLES ET ÉGOUTTOIRS

Porte-fûts robinets, cire, capsules, etc.

Maison DUVAL Frères

V^e G. DUVAL et H. SCHAEFFER, Suc^e

18, rue Alsace-Lorraine, ROUEN. - Tél. 9.54

Ateliers de Fabrication et de Réparation

55, 57, rue des Augustins

A cette adresse : Magasin de vente d'Articles de Laiterie

CIDRES, BOISSONS de CIDRE

fermentés, prêts à boire ou sortant du pres-
 soir, pour bouillir en cave au gré du client.
 Petites et grosses provisions.....

MAISON DE CONFIANCE

BRASSERIE DES PRAIRIES ST-GERVAIS

Léon TÉNIÈRE

99, Avenue du Mont-Riboudet, ROUEN

SI

VOUS AVIEZ FAIT INSÉRER UNE ANNONCE
 A CETTE PLACE

. . . ELLE AURAIT ÉTÉ CERTAINEMENT REMARQUÉE
 PETITE DÉPENSE GROS PROFIT

GALVANISATION ROUENNAISE

Rue de la Ferme prolongée

- TÉLÉPH. 14.37

GALVANISATION A FAÇON

E. GOMICHON

PLAQUES ÉMAILLÉES EN TOUS GENRES

TÉLÉPHONE 14.37

18 et 20, Rue Lafayette — ROUEN

TÉLÉPHONE 14.37




7^e CONGRÈS de la FÉDÉRATION NORMANDE - Sotteville-lès-Rouen - 24 Mai 1914.

Ce congrès a été, pour les organisateurs un véritable succès, dont il faut chaleureusement les féliciter. Au point de vue Esperanto, ils ont obtenu que M. Tilloy, Conseiller Général, Maire de Sotteville, assiste officiellement, avec ses adjoints, à la séance du Congrès tenue à l'Hôtel-de-Ville.

Ils ont pu faire apposer sur une rue de leur cité une plaque portant le nom de *Rue Docteur Zamenhof*, auteur de *l'Esperanto*, et dont l'inauguration a été faite en grande pompe, le matin du Congrès, par la Municipalité, les Congressistes et les membres des Sociétés locales. Louons également les groupes normands d'Argentan, Bolbec, Le Havre, Lillebonne, Louviers et Rouen qui, en sus des délégués au Congrès, ont envoyé 32 élèves pour les examens de *Lernado* et 6 pour ceux de *Kapableco*, et aussi de nombreux artistes qui, avec ceux de Sotteville, ont contribué à donner de l'entrain à la fête. Remercions aussi de leur présence significative : M. Rollet-de-l'Isle, Ingénieur-hydrographe en chef de la marine, Président de la Société française d'Esperanto venu spécialement de Paris, M. Cléry, Ingénieur en chef des Ponts et chaussées à Rouen, ainsi que les nombreux délégués cantonaux et fonctionnaires de l'enseignement, des douanes des contributions etc., et regrettons que nos ressources nous empêchent de publier les remarquables discours prononcés à cette occasion par MM. Tilloy, Cayeux, Rollet-de-l'Isle, etc....

Lettre du Docteur Zamenhof. Al la 7^a Kongreso de la Normanda Federacio Esperantista, mi sendas mian koran saluton. Al la konsilantoj de la urbo Sotteville-lès-Rouen, mi sendas mian sinceran dankon pro la granda honoro kiun ili faras al





7^e CONGRÈS de la FÉDÉRATION NORMANDE - Sotteville-lès-Rouen - 24 Mai 1914.

Ce congrès a été, pour les organisateurs un véritable succès, dont il faut chaleureusement les féliciter. Au point de vue Esperanto, ils ont obtenu que M. Tilloy, Conseiller Général, Maire de Sotteville, assiste officiellement, avec ses adjoints, à la séance du Congrès tenue à l'Hôtel-de Ville.

Ils ont pu faire apposer sur une rue de leur cité une plaque portant le nom de *Rue Docteur Zamenhof*, auteur de *l'Esperanto*, et dont l'inauguration a été faite en grande pompe, le matin du Congrès, par la Municipalité, les Congressistes et les membres des Sociétés locales. Louons également les groupes normands d'Argentan, Bolbec, Le Havre, Lillebonne, Louviers et Rouen qui, en sus des délégués au Congrès, ont envoyé 32 élèves pour les examens de *Lernado* et 6 pour ceux de *Kapableco*, et aussi de nombreux artistes qui, avec ceux de Sotteville, ont contribué à donner de l'entrain à la fête. Remercions aussi de leur présence significative : M. Rollet-de-l'Isle, Ingénieur-hydrographe en chef de la marine, Président de la Société française d'Esperanto venu spécialement de Paris, M. Cléry, Ingénieur en chef des Ponts et chaussées à Rouen, ainsi que les nombreux délégués cantonaux et fonctionnaires de l'enseignement, des douanes des contributions etc., et regrettons que nos ressources nous empêchent de publier les remarquables discours prononcés à cette occasion par MM. Tilloy, Cayeux, Rollet-de-l'Isle, etc. . . .

Lettre du Docteur Zamenhof. Al la 7^a Kongreso de la Normanda Federacio Esperantista, mi sendas mian koran saluton. Al la konsilantoj de la urbo Sotteville-lès-Rouen, mi sendas mian sinceran dankon pro la granda honoro kiun ili faras al



mi donante mian nomon al unu el la stratoj de sia urbo. Al la urbo mem, mi deziras ke mia nomo, troviĝanta de nun sur unu el ĝiaj stratoj, alportu al ĝi feliĉon.

ZAMENHOF - MAJO 1914.

Résolutions et vœux du Congrès. 1° Pour l'année 1915, le taux par membre de la cotisation fédérale sera supérieur de 0.15 à la cotisation réclamée par la Société française ; la cotisation fixe de 10 fr. restant à la charge de la fédération.

2° Le 8^{me} Congrès de la Fédération Espérantiste Normande aura lieu à Rouen si la Société française accepte de tenir dans cette ville sa réunion de l'année 1915. Dans le cas contraire, le Congrès fédéral se tiendra au Havre.

3° Vœu que le Comité du 10^{me} Congrès délivre des cartes pour la séance d'ouverture du Congrès de Paris, afin de permettre aux instituteurs, professeurs, fonctionnaires, et d'une façon générale, à toutes les personnes dont les vacances ne coïncident pas avec la semaine du Congrès, d'y assister partiellement.

4° Les membres du 7^{me} Congrès de la Fédération Normande expriment à M. le Maire et à MM. les Conseillers municipaux de Sotteville leur sincère reconnaissance pour la marque de sympathie qu'ils ont témoignée à l'Esperanto en donnant, à une rue de la ville, le nom du Docteur Zamenhof.



Rouen. — La municipalité de Rouen vient d'accorder une subvention de 75 francs au Groupe Espérantiste de notre ville.

ERINOFILIO (8^a Artikolo)

(Sekvo — Vidu la antaŭajn numerojn depost Novembro 1913)

Krom la sigelmarkoj de ni priskribitaj en antaŭaj kronikoj, jen aperis en la esperantista mondo novaj memorigaj markoj por la jaro 1914.

La VI^a Belga Kongreso de Esperanto, kiu havos lokon en Mechelen la 31^{an} de Majo kaj 1^{an} de Junio eldonigis beletan serion da markoj litografe presitaj en kvar koloroj (blua, ruĝa, verda kaj bruna) sur blanka papero. En la centro de tiuj simplaj kaj malgrandformataj markoj vidiĝas urba sonorilarejo: dekstre kaj maldekstre balanciĝantaj sonoriloj, malsupre la unuaj muziknotoj de la himno « La Espero ».

Por anonci kaj reklami la post kongresan ekskurson al la kasteloj apud la rivero Loire (11^{an} de Aŭgusto 1914) la Esperantista Federacio de Centrokecidenta Franclando verkigis ankaŭ serion da markoj kiuj prezentas la vizitotajn kastelojn (nome : Blois, Chambord (2 vidaĵoj), Amboise kaj Langeais.) Ĉiu kastela vidaĵo montriĝas en kadro, kies koloroj estas blua, ruĝa, verda, bruna kaj viola.

Fine mi citas la dekekezempleran diverskoloran markaron eldonitan de la IX^a Germana Esperantista Kongreso okazonta en Leipzig de la 30^a de Majo ĝis 3^a de Junio 1914. La desegno de tiuj markoj vidigas la Esperanto-domon en la Ekspozicio de Libroindustrio en tiu-ĉi sama urbo. Sed la bildo ne tute kontentigis la kongresan komitaton, kiu sekve intencas eldoni alispecan markon. Laŭeble ni ĝin priskribos en venonta artikolo.

Notinda fakto estas, ke la Komitato mem de la dirita Ekspozicio disdonas ankaŭ specialan artplenan markon, kies surskribo estas presita en multaj lingvoj kaj aparte en la lingvo Esperanto. Jen estas la esperanta teksto : « Leipzig 1914 - Majo-oktobro - Internacia Ekspozicio de libroindustrio kaj de grafikaj artoj » Same en Genova (Italujo) la marko de la internacia Ekspozicio (1914) estas skribita en Esperanto. Ambaŭ estas gravaj signoj de la disvastiĝo de Esperanto en la mondo, kaj pravas, ke diversaj naciaj institucioj ĝuste konscias pri la profito, kiun povus liveri al ili la uzado de nia helpa lingvo. MARKAMULO.

LITTÉRATURE ÉTRANGÈRE

Nous avons créé cette rubrique pour répondre au désir de nos lecteurs qui se déclarent friands de connaître un peu la littérature des pays étrangers, particulièrement celle des régions de langues peu connues. D'autre part un grand nombre d'Espérantistes (français et étrangers) demandent à trouver des textes français qu'ils puissent lire aidés de textes Esperanto. Nous indiquerons toujours à cet effet le volume où nous aurons été autorisés à puiser. NOUS ESPÉRONS FAIRE AIMER AINSI L'ESPERANTO AUX FRANÇAIS ET LE FRANÇAIS AUX ESPÉRANTISTES.

Lire dans un prochain numero : *Les Galoches* fragment d'un ouvrage en langue Tartare (Kuzneck) de Iŝhakov traduit d'abord en *esperanto* par JUSUF KAZAKOV, puis de là en *français*.

ENKONDUKO AL ESPERANTO PER HISTORIO DE LA NACIAJ LINGVOJ



parto franca

ORIGINALE VERKITA EN ESPERANTO DE

DOKTORO PANEL

Sekvo (Vidu de la numero de Majo 1914.)

UNUA PARTO ĜENERALAJOJ

PARENCECO DE LA LINGVOJ

La iniciatinto de la scienco pri la lingvoj estas germana poeto Schlegel. Li eldonis en 1808 libron : « pri la lingvo kaj la saĝo de la Indianoj ». Schlegel ne estis grande sciencisto, multaj liaj asertoj estas eraraj, sed li estis geniulo, kaj kiam la temo estas krei novan sciencon, la imagemo de poeto estas pli necesa ol la ĝusteco de sciencisto. Estis ja necesa genia vido, por ampleksi, de la unua rigardo, la lingvojn de Indujo, Persujo, Grekujo, Italujo, kaj Germanujo en una sola familia nomo : lingvoj indo-germanaj. Ni nun nomas ilin lingvoj : indo-eŭropaj aŭ pli taŭge : lingvoj arjaj.

La opinio kiun mi ĵus skribis ne estas mia, ĝi estas eldirita de fama lingvisto Sro Max Muller (A) longe antaŭ la tempo kiam li aprobis l'Esperanton. (B) Ĉu ni povas preterpasi tiun citon ne rimarkante kiom la laŭdoj adresitaj al Schlegel adaptiĝas al Zamenhof ?

La lingvo Esperanto estas kreita de poeto. Neniam malvarme scienca elpensinto estus kuraĝinta entrepreni tian taskon sur tiaj bazoj. Ĝi estas sintezo de la arjaj lingvoj. Ĝi heredas ĉiujn akcidentojn suferitajn de siaj gepatroj sur vojo trairita dum multaj jarcentoj. Esperanto estas nur moderna formo de la lingvo arjo. Imagi tian revon povis nur poeto gvidata de homama koro.

Tiuj kiujn ne trafis iom da idealo, kiujn gvidas nur la rezono ne povas kompreni, eĉ post la akirita rezultato, ke la problemoj estis solveblaj.

(A) *Scienco pri la lingvoj* (p. 171)

(B) *Privat : Historio de la lingvo Esperanto* (p. 40)

rimarkas inter ili certan kaj facile videblan parencecon. Ĉiuj venas el la latino. Oni nomis ilin latinidoj.

Kvankam tre apartigitaj unu de la aliaj, kvankam parolanto de unu ne estas komprenata de la parolantoj de la aliaj, oni facile vidas ke tiuj lingvoj havas, se ne saman, almenaŭ similan gramatikon, ke multaj vortoj havas grandan similecon.

La latinidoj nin kondukas al la latino. La parencecon kiun ni rimarkis ĉe la latinidoj, ni retrovas ĉe la greko kompare kun la latino, ĉe la sanskrito, malnova lingvo de Indujo, kompare kun la greko, ĉe la zendo, malnova lingvo de Persujo, kompare kun la sanskrito, ĉe la goto, malnova lingvo de Germanujo, kun la greko, sanskrito, latino, k. t. p. Ankaŭ la kelto, malnova lingvo, iam parolata en la regiono kie ekzistas nun Francujo kaj parto de Belgujo, Hispanujo, Italujo kaj Svisujo, havas parencecon ne duban kun la ceteraj lingvoj. (A)

Sume, zendo, sanskrito, greko, goto kaj devenintaj teŭtonaj lingvoj, latino kaj slavo eliris el ia primitiva lingvo, komuna patro de la tuta familio, kiun oni nomas arjo.

Arjon neniu konas, ĝia ekzisto estas certa sed la tempo kiam ĝi ekzistis estas tiel malproksima ke restas neniu dokumento. Kiam ekzistis arjo samtempe ekzistis aliaj lingvoj; inter aliaj semito kiu estas patro 1^o de l'arabo, lingvo de la araba duoninsulo, alportita poste en Afrikon ĉe la sudo de Egiptujo, kaj disvastigita, pere de la mahometa religio, en Azion, Afrikon kaj Eŭropon; 2^o de l'hebrea, lingvo de Palestino, kies dialekton parolis la Kartaganoj kaj kiu ekzistis preskaŭ ĝis nun en Etiopio; 3^o de l'arameno parolita iam en Sirujo, Mezopotamio, Asirio, kaj Babilonio.

Samtempe kun arjo kaj semito ekzistis turano. Turano same kiel arjo ne estas konata; ĝi estas simple oportuna nomo por esprimi lingvon tre malnovan, el kiu devenis lingvoj kiuj havas inter si grandan fratecon, ni aludas dialektojn de vagantaj popoloj en nordo kaj centro de Azio; tiuj-ĉi lingvoj estas tonguzo, mogolo, turko, samojedo kaj fino.

Ĉu arjo, semito kaj turano havis ankaŭ komunan patron,

(A) *Adolphe Pictet: Parenceco de kelto kun sanskrito Paris 1837.*

tio estas tre versaĵna kaj Max Muller (A) tiele opinias skribinte.
«Se rairante al la neklaraj komencoj, ni rigardas, tiun grandan riveron kiu trafluas jarcentojn en la tri nomitaj fluejoj, ni klare vidas ke ĝi venas el unu sola fonto ».

Sed ni tuŝas la malhelan tempon kiun eble ni neniam konos, pri kiu la historio sin apogas sur konjektoj. Cetere ni ne bezonas iri pli malproksimen ol la certe konata epoko por certigi ke ĉiuj lingvoj parolataj sur la terglobo havas inter si parencecon. Ĉe kelkaj la sango estas frata, ĉe aliaj la sango estas nur pli malpli proksime kuza ; sed ĉe neniu ĝi estas absolute fremda de la aliaj.

La plej granda surprizo por la novebakitaj esperantistoj estas konstato ke l'Esperanto, tiel facila por ili, estas ankaŭ tre facila por la alinaciuloj.

La kaŭzo de tiu-ĉi fenomeno estas tre simpla, ĉiuj lingvoj devenas el unu sola fonto, kvankam ili tre malsimilas unu la alian supraĵe, en la profunda ŝtofo, la kanvaso estas simila. La skeleto de la lingvoj estas kreita de la homa penso, kaj la leĝoj de la homa penso, almenaŭ la plej ĝeneralaj leĝoj de la homa penso estas ĉieaj kaj ĉiamaj. Tial Locke estis prava studente la lingvajn demandojn pere de la psikologio.

La forto de l'Esperanto, la sekreto de ĝia sukceso estas en la simpleco de ĝia fundamento kiu perfekte reproduktas la konstantajn leĝojn de la homa penso.

La semitaj lingvoj estas ekster nia programo sed estis utile ilin signali kiel malproksimaj parencoj sed tamen parencoj.

La turanaj lingvoj estas pli interesaj por la Esperantistoj ; kvankam ili estas tre malproksimaj de la franco ni devos iom ekzameni ilian konsiston.

La araj lingvoj, ĉar la franco estas lingvo parolata de araj popoloj, estas la temo mem de tiu-ĉi studo.

KLASIGO DE LA LINGVOJ

Se oni ekzamenas la parolatajn lingvojn laŭ alia vidpunkto, oni vidas ke ili apartiĝas en tri klasoj.

La lingvoj silabaj, tia estas la ĥino; la lingvoj aglutinaj, tia

(A) *Scienco pri la lingvoj* (p. 55)

estas la turko kaj aliaj apudaj lingvoj ; la lingvoj fleksitaj, tia estas la franco kaj la aliaj arjaj lingvoj.

Tiu-ĉi apartigo en tri klasoj estas nek diskutebla nek diskutata. Tamen la karakteroj ne estas absolutaj. La plej malnova formo de la lingvoj estas la silaba, la plej nova estas la fleksa ; de la unua al la lasta oni venas tra la aglutina. Neniu lingvo estas tute fleksita, neniu nure aglutina, neniu nun ekzistanta estas absolute silaba.

Lingvoj silabaj. — La ĥino estas silaba ; ĝi konsistas el silaboj. Ĉiu vorto estas figurata de unu silabo; neniu kunfandado de la elementoj ekzistas, neniu analizo estas bezonata por elvidigi la elementojn ; ĉiu vorto estas radikoj, kaj ĉiu radikoj estas vorto.

Ĉiu radikoj estas uzata ĉu kiel substantivo, ĉu kiel adjektivo, ĉu kiel verbo, sen ŝanĝo de formo; ĉio dependas de ĝia loko en la frazo. Ekzemple la ĥina sono « *ta* » signifas sen ia ŝanĝo ĉu granda, ĉu grandeco, ĉu esti granda (A). Ĉu ĝi kuŝas antaŭ substantivo ĝi estas adjektivo «*ta ĵin*» signifas : granda homo ; ĉu ĝi kuŝas post substantivo ĝi estas verbo «*ĵin ta*» signifas : la homo estas granda.

La ĥino ne posedas devenigajn sufiksojn, ĝi ne povas devenigi « nevidebla » de « vidi » tamen la sama ideo kiun ni esprimas per « nevidebla » estas montrata facile, oni diras « *han pu kien* » laŭ vorte (rigard [i] ne vid [j]) (B). Tamen la ĥinaj gramatikistoj konsideras en sia lingvo du specojn de silaboj, la plenajn kaj la malplenajn. Ni Esperantistoj komprenas facile ; la silaboj plenaj estas radikoj dum la malplenaj ludas rolon de sufiksoj, sed la silaboj restas izolitaj. Iaj radikoj ne povas esti indiferente substantivo, adjektivo aŭ verbo; ekzistas esceptoj, kaj tio pruvas ke la ĥina lingvo, kiu estas por ni la plej primitiva stato de la lingvoj, estas jam tre longe vivinta. Ĉe la ĥinaj dialektoj oni trovas kelkajn komencojn de aglutinoj.

Kiam oni rimarkas ke la Ĥinoj havas kutimon konsideri la

(A) Max Muller, *Scienco de la lingvoj* (p. 290) Endlicher, *chinesische gramatik* § 125.

(B) Max Muller, *tavoliĝo de la lingvoj* (p. 19)

valoron de ĉiu silabo, kaj la reciprokan agon de la silaboj unu sur la aliaj; kia n oni scias ke unu ideo kiun ni metas en unu vorto estas formata per pluraj silaboj (silaboj kiuj estas radikoj) oni estas malpli mirigata ke la Ĥinoj trovas facila la analizon de la esperantaj vortoj, formataj de eroj kiuj posedas ĉiu sian valoron kaj rolon.

Tial estos ĉiam forta devo por Esperantistoj atenti ke ilia lingvo estas lingvo per radikoj, ne lingvo per vortoj.

Tial, estos ĉiam konsiderinde ke la silaboj signifajn estu tro facile enkondukataj sen signifo, pere de radikoj tiel diritaj internaciaj.

Lingvoj aglutinaj. — La karaktero de la lingvoj aglutinaj estas ke la vortoj estas formataj per du partoj, la radiko kaj la sufikso. La radiko estas ne difektigebla de la sona ŝanĝo; oni konservas ĉiam la konscion ke tiu-ĉi parto de vorto estas radikoj, oni ne estas ĉiam tre dokumentita pri ĝia etimologio, pri ĉiu precizo kaj detalo de ĝia signifo sed oni neniam forgesas ke ĝi estas radiko. La sona ŝanĝo povas agi nur sur la sufikso, tiu-ĉi finaĵo povas esti misuzata, pro imito de aliaj vortoj aŭ pro eraro; oni povas ne plu memori pri la primitiva signifo de la finaĵoj, sed ĉiam oni vidas klare la malsimilecon kiu ekzistas inter la radiko signifa, ne ŝanĝigebla kaj la ŝanĝemaj elementoj kiuj ĝin modifas.

Lingvoj fleksitaj. — Male, ĉe la fleksitaj lingvoj, ĉe niaj latinidaj lingvoj, la elementoj kiuj formas la vortojn povas esti tiel kune ligitaj kaj tiel komplete modifitaj, per ago de sona ŝanĝo, ke atenta ekzameno de lingvista anatomiisto kaj fiziologiisto estas necesa por apartigi radikonde ĝiaj modifiloj.

Miksajo de la tri klasoj. — La apartigo en tri klasoj, silabaj, aglutinaj, fleksitaj ne estas absoluta, oni ne povas dubi ke la fleksitaj lingvoj trapasis periodon aglutinan. Kvankam ni ne konas la arjajn lingvojn dum ilia aglutina periodo ni trovas en ili kiam ni ekzamenas ilin kune, kaj ne unu el ili solan, sufiĉe da postsignoj ne dubaj por certigi ke tia estas ilia historio.

Tiu-ĉi grava historia fakto neniam devas esti forgesata kiam oni ekzamenas la vivon de ia lingvo. La lingvoj estas vivaj estaĵoj pli malpli junaj; la junaĝo estas silaba, la maturaĝo

estas aglutina, la maljunago estas fleksita. Sed same kiel ĉe homo estas organoj pli malpli eluzitaj, same ĉe lingvoj ĉiuj partoj ne estas samaĝaj.

La lingvoj, kiuj komencas silabe, trairas periodon aglutinan kaj fine iĝas fleksitaj, estas influataj de la kondiĉoj de la vivo de la popoloj kiuj ilin parolas.

En la nomo : lingvo turana, oni trovas la ideon de lingvo de popolo migranta. Male, en la nomo : arjo, oni devas vidi la ideon de lingvo de terkulturistoj, de popoloj alligitaj al la tero kiu ilin nutras, de popoloj neniel vagantaj sed nepre fiksitaj. Sed oni ne komprenu la difinon tro absolute, kiam oni diras ke la turanaj nacioj estas vagantaj, oni parolas kompare, oni intencas diri ke ili estas malpli fiksitaj ol la arjaj nacioj, tiaj estas la Bulgaroj, Hungaroj, Turkoj, sed ankaŭ ĉe tiuj-ĉi popoloj la lingvoj pli alproksimiĝas al la fleksoj ol la lingvoj : mongolo, fino, samojedo, tibeto, siamo, malezo.

Oni havus malveran opinion pri la turanaj lingvoj si oni kredus ke ili ne ŝanĝiĝas. Ili ŝanĝiĝas eĉ multe pli rapide ol la arjaj lingvoj. Ĉiu roto, kiu sin izolas de popoloeto, kreas novajn radikojn kiuj ne estas kompreneblaj de la naskinta popoloeto, la naskinta popoloeto ankaŭ alprenas novajn radikojn kiuj kompreneble ne estas konataj de la migrinta roto. Tial la multaj lingvoj de la turana familio estas multe pli diversaj ol la lingvoj de la arja familio. Tamen se unu grupo de iu popoloeto sin unuigas kun alia popoloeto, ĝi rapide eklernas la lingvon de la popoloeto al kiu ĝi venas, eĉ kiam inter la lingvoj de la du grupoj ekzistas proksimume neniu komuna vorto. Tiu-ĉi fenomeno estas kaŭzata de la samfamileco kies karaktero estas aglutino.

KARAKTERO DE LINGVOJ AGLUTINAJ

Tiun-ĉi karakteron (aglutino) ni devas akurate difini kaj atente studi ĉar ĝi havas gravan intereson por Esperantistoj. Per tiu-ĉi kvalito ni ne intencas diri ke la radikoj signifaj unuigis kun pronomoj por fari konjugaciojn de verboj, aŭ kun prepozicioj por fari deklinaciojn de substantivoj; tion ankaŭ faris la aliaj lingvaj familioj ĉe iliaj komencoj, ni intencas rimarkigi ke la turanaj vortoj estas erigeblaj en iliaj elementoj.

Kelkaj eroj ludantaj rolon de sufiksoj perdis ja la signifan



valoron kiun ili havis komence, sed tamen oni vidas ĉiam ke ili estas vorteroj ne apartenantaj al la radiko kaj ke ilia rolo estas modifi en ia direkto la radikon.


Vagantaj popoloj nepre bezonas vortojn facile analizeblajn de ĉiu uzanto, kiom ajn maloftaj estas la rilatoj de la uzantoj. Turano posedas sian lingvon ne per la formo sed per la ideo. La opinio kiun li havas pri la pluralo estas radiko sekvata de ia signo montranta pluralecon. Tiu rezultato povas esti akirata per diversaj solvoj, la principo estas unu.

Se ni aplikas supoze al Esperanto la karakteron de la turanaj lingvoj ni klarigos facile kiel du solvoj povas esti apliko de unu sola principo. Povus ekzisti Turananoj-esperantistoj kiuj adoptus ke la signo « j » montras la pluralon; por ili la signo « j » sola prezentas al ili ideon kvazaŭ amaso, nombro, mal-unuo; en homoj, ili vidus homo en nombro plia ol unu. Povus ekzisti alia turana esperantista popolo kiu adoptus ke la signo de pluralo estas « aro ». Tiu-ĉi silabo por ili estas signifa de amaso, nombro; en homaro, ili vidus homo en nombro plia ol unu. Povus ekzisti tria turana esperantista popolo kiu adoptus ke la signo « opo » montras la pluralon; por tiu-ĉi popolo la silabo « opo » havus personan signifon de amaso, nombro; en homopopolo tiu-ĉi popolo vidus homo en nombro plia ol unu.

Povas esti ke ĉiu popolo ne konas la silabojn uzatajn por la pluralo de la aliaj nacioj, sed estos por ĝi tre facile eklerni la silabon bezonatan, kaj ĉar la principo estas la sama kaj nur la iloj variaj, Turanano facile eklernos la lingvon de alia Turanano.

Ĉe la turanaj lingvoj io restas karakteriza, la vorteroj eĉ ne rekoneblaj laŭ ilia personeco, ĉiam estas vorteroj. Oni ne memoras kion ili signifas en ili mem, sed oni vidas ke ili estas vorteroj disigeblaj el la signifa radiko kaj ĝin modifinta en ia direkto. Ni tuj aldonu ke la kazoj en kiuj la signifo de la sufiksaj vorteroj estas forgesita ne estas multaj ĉe la turanaj lingvoj dum ili iĝas preskaŭ regulo ĉe la fleksitaj lingvoj.

Societo, tradicio, literaturo, jen la tri agantoj kiuj permesas ke lingvo posedu vortojn kun nereko neblaj, ne disigeblaj, ne



BIBLIOGRAFIO

Normanda Stelo rend compte, signale, annonce, critique ou analyse tous les ouvrages qui lui sont envoyés. La eldonistoj kiuj deziras ke **Normanda Stelo** raportu detale pri iliaj verkoj estas petataj sendi donace po du ekzempleroj de libroj.

STIRIO - Heckners Verlag - Wolfenbüttel Graz - Prezo 1 respondkupono.

Gvidlibro kun belegaj bildoj, lukso presita, pri la verda Stirio. La samideanoj kiuj iom sentas emon al turismo, ricevante tiun libreton facile rimenfermos la valizon kaj kuros al la stacio. Malfeliĉe multaj konsiliĝinte kun sia monujo restos hejme ; ili ankaŭ iluzios ke ili vizitas ĉarman landon. per rigardoj al la gvidlibreto, represo el *Universo*, kaj eldonita de *Landesverband für Fremdenverkehr in Steirmark* ; al kiu oni povas sin turni por ricevi la broŝuron resende de respondkupono.

10^e Congrès International d'Esperanto - Paris 2 au 9 Août 1914. Affiches, Cartes postales, timbres de Congrès. — Les affiches du 10^e Congrès, dessinées par notre samideano Agache sont vendues 1 fr. 50 pièce. Les exemplaires numérotés et signés par l'auteur sont cotés : série A (1 à 100) 5 fr. Les cartes postales 1 fr. la douzaine et les timbres 1 fr. le cent. Adresser les commandes 3, place Jussieu à Paris.

Pour attirer l'attention sur la *postkongresa ekskurso* aux châteaux de la Loire, M. Chaussard, secrétaire de Groupe d'Orléans, a édité une série de 5 vues différentes publiée en 5 couleurs d'encadrement, ce qui constitue une collection de 25 timbres que l'on peut se procurer au bureau de *Normanda Stelo* moyennant 0 fr. 50. L'envoi de ces diverses vignettes constitue une des meilleures propagandes espérantistes. Les étrangers recherchent avec curiosité ces *sigelmarkoj* et en forment de très intéressantes collections. Lire à ce sujet, dans *Normanda* les articles intitulés *Erinofilio*.

Cartes de propagande. - MM. Demarcy et Jodart, Président et Membre du Groupe de Beauvais, viennent de faire établir un nouveau *propagandilo*. Quatre personnages représentant les races blanche, rouge, jaune, noire s'entretiennent en Esperanto, sous les yeux et au grand désespoir d'un interprète polyglotte. Des inscriptions pour chaque pays, en langue nationale, accompagnent le tableau.

Prix : Cartes album, 1 : 0.20 — 2 : 0.30 — 12 : 1.20 (Port 0.05)

Cartes postales : 1 : 0.10 : — 2 : 15 — 12 : 0.75 id.

Cartes de visite : 100 : 2 fr. 50 - Port en plus 0.20.

S'adresser à M. Demarcy, 18, rue Sadi-Carnot, Beauvais.



FORMULARO

N° 4 - Fritpasto - Metu en tervazon 250 gramojnⁿ da faruno kaj centre 10 gramojn da salo, 30 gramojn da sukero, iom da konjako, iom da oleo; knedetu tiun paston mola kun varmeta akvo, kaj post tuta knedado enmiksi du ovblankojn neĝe kaj firme kirlitajn.

(*Unuigo Internacia de kukistoj-sukeristoj Esp.*)



Parlons l'Esperanto. — Le but que nous ne devons jamais perdre de vue dans notre propagande est de faire de l'Esperanto une langue parlée. Nos efforts resteraient à peu près stériles si nous n'apprenions ou n'enseignions l'Esperanto que comme on apprend ou enseigne une langue morte. Il faut que le professeur le parle à ses élèves et fasse le cours d'Esperanto en Esperanto.

Général MATTON, Gouverneur de Besançon

Nous recommandons spécialement à nos sociétaires et à tous les Espérantistes, les commerçants qui nous aident en insérant leurs annonces dans notre bulletin. Les acheteurs auront toujours avantage à se faire connaître comme Espérantistes à ces commerçants.

Femmes qui souffrez

Rappelez-vous que le

THÉ LALEUF Formule de Sœur Scolastique, de l'Ordre
des **BÉNÉDICTINES**

est le seul remède efficace pour éviter et combattre

tous les **Troubles du Retour d'âge**

Son usage quotidien régularise la **CIRCULATION DU SANG** et fait disparaître :

Chaleurs.
Vapeurs
Étourdissements.
Étouffements.
Vertiges.
Bourdonnements.

Migraines.
Névralgies.
Palpitations.
Insomnie.
Maux de reins.
Hémorroïdes.

Constipation.
Mérite.
Pertes blanches.
Hémorragies.
Neurasthénie.
Rougeurs du Visage.

Varices, Phlébites.
Irritations nerveuses
Digestions difficiles.
Anémie.
Règles douloureuses
et irrégulières.



Le THÉ LALEUF, quoique de beaucoup plus actif que tous les remèdes préconisés (Elixirs, Pilules, Cachets, etc.), est aussi le moins coûteux : le traitement revient à peine à 8 centimes par jour.

La botte (traitement de 1 mois environ), 2 fr. 25 ; franco : 2 fr. 50. — Les 6 b. (p^r une cure), 13 fr. franco, Notice, renseignements, échantillon gratuit (joindre timbre).

Adresser toute demande aux **LABORATOIRES LALEUF — ORLÉANS**

SINJORINOJ

Monaĥo pelita el Francujo kun lia religia societo konfidenciis al iu amiko sekreton pri mirinda likvoro, kiun la loĝantoj de la monaĥejo, kiuj uzis ĝin de jarcentoj, nomis inter si **CREDO**.

Pro ĝia aromo subtila, kaj ĝia gusto delikata **CREDO** kiun ĉiu ajn povas prepari senpere per simpla infuzo, egalas la plej famajn markojn. Ĝiaj digestigaĵ kvalitoj, ŝuldataj al maloftaj herboj, estas nekompareblaj. Ĝi estigas refortigilon de unua rango, komunikanta al la tuta organismo mirindan energion, kaj konvena por esti tolerata eĉ de la stomakoj delikataj kaj lacaj.

La prezo de la kreskaĵoj ekzakte dozitaj por du litroj de **CREDO** estas 1 fr. 25 (duono de spemilo). Ĝi estas la likvoro altkvalita, la precioza kaj delikata likvoro monaĥa, metita je la dispono de ĉiuj, ĉeestanta sur ĉiuj tabloj por la ĝojo kaj la bono de la invititoj, kaj por la intima kontentiĝo de ĉiuj gastantinoj.

Ekspedo aŭfrankite kontraŭ repago de 1 fr. 50 (0.60 spm) per simpla peto al : Mr. de Saint Blancard, 53, rue Vivienne, Paris.

Specialaj kondiĉoj por negocistoj pomalgrande ; kaj por makleristoj.

à Ce qu'il y a à
10 ANS de **20 ANS**
meilleur

POUR SE FORTIFIER

C'est de prendre chaque jour
4 cuillerées à café d'

HÉMO-VITAL

L'HÉMO-VITAL est un granulé sucré
très agréable à prendre

RÉPARATEUR ET FORTIFIANT DU SANG
STIMULANT DE L'APPÉTIT

L'HÉMO-VITAL est le remède le plus
sérieux contre la Faiblesse et l'Anémie.
Il guérit la Neurasthénie. Fortifie pen-
dant et après la grossesse. Aide à la
formation et à la croissance des enfants.

DANS TOUTES LES PHARMACIES
3 fr. 75 le flacon | 4 fr. 25 par la poste

à et contre Mandat à à
30 ANS **M. E. TABART** **60 ANS**
PHARMACIEN
49, rue du Loing
à MONTARGIS (Loiret)

Dépôt : Pharmacie MILVOY et BENARD
Place de la Cathédrale, Rouen



ELDONOJ DE NORMANDA STELO, 44 rue de la Vicomté, Rouen 1^o VERKOJ

Studo pri la Vortfarado de Esperanto, originale verkita en Esperanto
de Doktoro Panel.

GVIDLIBRO tra Rouen - Volumo bele ilustrita 107 paĝoj	ELĈERPITA fr. 0.60
tra Le Havre kaj Bolbec bele ilustrita : du respondkuponoj	fr. 0.50
tra Granville, St-Pair-sur-Mer, îles Chausey, Mont-St-Michel	fr. 0.50
Le Fiancé Malchanceux - Comédie de propagande espérantiste	fr. 0.50

2^o PROPAGANDILOJ REKOMENDINDAJ

Cent vizitkartoj kun stelo verde presita	spm 1 = fr. 2.50
Cent folioj de leterpapiro kun stelo verde presita	spm 0.50 » fr. 1.25
Cent leterkovriloj kun granda stelo verde presita	spm 0.50 » fr. 1.25
500 glumarkoj esperantistaj verde presitaj	spm 1 » fr. 2.50
1000 jetkartonoj esper. ĉiedisdonataj, : ĉe restoracioj, kafejoj, firmoj	» fr. 3.50

ESPERANTIO

Le Bourgogne Mousseux des Espérantistes (de notre samideano Gaston CHARCOUSSET) doit se trouver sur toutes les tables

La bouteille emballée : fr. 2, 2.50, 3 et 3.50 - Livraison par caisse de 6, 12, 18, 24 etc, bott. assorties ou non

Adresser commande avec mandat à l'agent général :

J. PION-MULLER, Esperantio, 21. rue de Lorraine, BEAUNE (Côte-d'Or)

KOLEKTANTARA FAKO

Petite Correspondance Internationale

Malgranda Korespondado Internacia

Ne komercaj anoncetoj por intersaĝo
de poŝtkartoj, poŝtmarkoj, fotografaĵoj
glumarkoj, leteroj, ĵurnaloj kaj similaj,
(5 centimoj por ĉiu vorto por ne abon-
intoj), (ne page por abonintoj).

ABONNEMENTS INDIVIDUELS REMBOURSABLES

*L'Abonnement à Normanda Stelo
ne coûte rien puisque les abonnés
peuvent faire gratuitement une in-
sertion sous la rubrique ci-contre.*

SIGELMARKOJ oficiale eldonitaj de la Esperantista Federacio de Centrokcidenta Francan-
do, okaze de postkongreso ekskurso al la kasteloj de Loire (11 Aŭgusto 1914). Bela kolekto
da 25 malsamaj markoj — Prezo 0 fr. 50 c. — Po cento (4 kolektoj) 1 fr. 50. Sin turni al
S^{ro} Chausseard, 127 bis faubourg Bannier, Orléans kiu sendas aŭfrankite.

S^{ro} Th. Liébard, 4, rue de Barcelone, Rouen, eldonis belegan kolekton de sigelmarkoj por la esperantista
propagando. Prezo aŭfrankite unu kolekto 173 malsamaj markoj kontrati fr. 0.50 = 2 respond kuponoj kaj
200 markoj kontrati fr. 1.25 = 5 resp; kaj 500 kontrati fr. 2.50 = 1 spm = 10 respk intersaĝas ankati
ĉiuspecajn sigelmarkojn.

Mlle SONNET "Les Rosiers" à St-Pair-sur-Mer (Manche) désire recevoir
médaillles commémoratives civiles ou religieuses et cartes postales repro-
ductions salons 1914, timbres-réclames. Remerciera selon désir.

S^{ro} Furcy Racine, 120, bd, de la République, Abbeville (Somme) intersaĝas
poŝtkartojn kun gesamideanoj

S^{ro} Davidov, Poŝtkesto 12, Saratov, (Ruslando) esperantajn sigelmarkojn
aĉetas kaj sendas siajn proprajn eldonojn : 100 diversajn = 60 sd.

Adresojn de kolektantoj presigas Studenta gazeto obroda s^o Srp. Vodičkova
38, Praha II, Bohemujo.

CHOISISSEZ BIEN VOTRE ORGANE DE PUBLICITÉ

Une revue spéciale, atteignant un public déterminé vaut cent fois mieux
qu'un journal même très répandu. Cette dernière publication ressemble à un
mur ; on y regarde parfois les affiches . . . puis on passe. Le journal spécial est
conservé, relié et relu. Sa publicité a un caractère documentaire. Les lecteurs
le consultent comme un catalogue. Tel est le cas du bulletin esperantiste
Normanda Stelo.



19, QUAI DU HAVRE, ROUEN — TÉLÉPH. 1204

E. W. SYLVESTER FILS

REMISE 5 0/0 AUX ESPÉRANTISTES

HUILES D'OLIVES D'ITALIE, PROVENCE, ALGÉRIE, ESPAGNE

Grands Magasins DU LINGOT D'OR

60, 62, 64, rue du Bac et rue des Fourchettes, ROUEN

Nouveautés, Ameublements en tous genres, Confections pour hommes et jeunes gens, pour dames, fillettes et enfants, Chaussures, Chapellerie, Lingerie, Bonneterie et Parapluies. Articles de Chauffage et d'Eclairage, Faïence et Porcelaines, Horlogerie, Bijouterie et Glaces.

Maison Fuhr LHIRONDEL et KUBIK S^{rs}

51, 53, rue Grand-Pont, ROUEN

ORTHOPÉDIE, BANDAGES, INSTRUMENTS DE CHIRURGIE

Spécialité de Corsets de Toilette pour Dames et Fillettes

GRAND HOTEL BARETTE

Téléphone 2068

JOURNÉE POUR VOYAGEURS

à 6.50 et 7

ÉCLAIRAGE ÉLECTRIQUE

Garçon de Courses

Salons pour Noces et Banquets - On reçoit Touristes en Groupes

ANCIENNE M^{me} LELOUP

35 et 37, Place Carnot (en face la gare d'Orléans) ROUEN

GRANDA HOTELO DE L'GLOBO

LA GEMASTRO

PARIS — *71, strato Monge*

ESTAS ESPERANTISTOJ

Ĉambroj de 2 ĝis 5 frankoj tage, de 25 ĝis 60 monato

ELEKTRA LUMO

HEJMA TELEFONO

POMPES FUNÈBRES

Les familles ont intérêt à éviter les intermédiaires, souvent très onéreux, elles peuvent s'éviter sans frais supplémentaires toutes démarches en s'adressant elles-mêmes au Service municipal des pompes funèbres, ou en faisant appeler à leur domicile un employé de ce service. S'adresser

102, rue de la République, Rouen, et 33, rue Benoist, St-Sever. Tél. 187

**Situation d'avenir aux personnes actives
& d'initiative**

Normanda Stelo accepte dans chaque localité, comme représentant, une personne sérieuse, active, énergique et d'initiative. Situation de grand avenir sans quitter emploi, surtout à celles ayant de nombreuses relations. - Ecrire avec détails (âge, profession, références). *41, rue de la Vicomté, Rouen. (t.p.r.)*

ENTREPRISE DE PEINTURE

E. RICHARD

Vice-Président de l'Union Amicale des Bas-Normands

91, Route de Caen

PETIT-QUEVILLY

MAISON SPÉCIALE

LINOLÉUM UNI

et Imprimé

Linoléum Incrusté

LEDRU & C^{ie}

19, Rue de la République
(Coin de la Rue St. Denis)

ROUEN

Papiers Peints

Toiles Cirées

Tapis — Carpettes

Moquettes

Remise 5 % aux Espérantistes

LA BONNE LORRAINE

1, Rue Verte, ROUEN

SOUVENIRS DE ROUEN

CARTES POSTALES



CONFISERIE

CORDONNERIE DU PALAIS

Chaussures de Luxe et de Travail

V^{re} A. HERMEL

1, Rue Rollon, 1 -:- ROUEN

ESCOMPTE 5 % AUX ESPÉRANTISTES

LAVEUSES DE LINGE AMÉRICAINES

Agence de Rouen

39, rue du Faubourg-Martainville

près le Champ-de-Mars

On demande des Agents

LINGVO INTERNACIA

Centra Organo de la Esperantistoj

La piej malnova el ciuj Esperantistaj

gazetoj, fondita en 1895

aperas post la 15. de ĉiu monato abono : 5 fr.

JUNA ESPERANTISTO

Monata gazeto por junuloj, instruistoj
kaj Esperanto lernantoj
Abonprezo. 3 fr.

Ambau gazetoj kune : 7 fr.

Specimenoj kontraŭ respondkuponoj

33, rue Lacépède, Paris

A LA NOUVELLE MAISON

Anciennement A LA MAISON D'OR

54, Rue d'Amiens

A. GORAT

196, 198, 245, Rue Eau-de-Robec - ROUEN

Matelas, couvertures, tapis, vente et achat de mobiliers

MEUBLES Neufs et d'occasion

AMEUBLEMENTS EN TOUS GENRES

Maison de confiance. — Ne pas confondre

Bien s'adresser à la « NOUVELLE MAISON »

CHEMISIER

OLOMBE, 62, Rue Jeanne-d'Arc, ROUEN

COUPE & QUALITÉ GARANTIES

Grand choix de Tissus haute nouveauté

CHEMISES SANS BOUTONS

CHEMISETTES SUR MESURE, façon chemisier

Envoi du catalogue sur demande

TÉLÉPHONE 12.60

Capital 125 millions

CRÉDIT DU NORD

31.250.000 fr. versés

SIÈGE SOCIAL A LILLE

SUCCURSALE DE ROUEN, 68, rue Jeanne-d'Arc (en face la Poste)

Escompte et Banque. — Achats et Ventes de titres. — Paiements de tous Coupons. — Location de Coffres-forts avec tarif décroissant suivant durée et dimensions. — Garde de Titres.

TROUSSEAUX & LAYETTES

Spécialité de Toiles

Lingerie fine

Linge de Table . . .

Mouchoirs

Mon Lucas-Leclín

CH. LUCAS, SUCC^r

11, rue du Change - 12, rue Grand-Pont. — ROUEN

VESTAJOJ POR VIROJ, JUNULOJ KAJ KNABOJ

THIERY kaj MARTIN 32, 34, 36, Rue de la République

— ROUEN —

—: DRAPOJ, VESTOJ, ĈAPOJ, ĈEMIZOJ :—

 **APPRENEZ L'ESPERANTO** 

Les Gérants: LIÉSARD, LEROUX.

Imprimerie BLONDEL, 21, rue Cauchoise à Rouen.